# *Assessores* kaj Historiistoj en la malfrua romia imperio

Temas ĉi tiu artikolo pri okulvido, ĉefe tiu de historiistoj verkantaj en la tria ĝis la sesa jarcento p.K. Gravis por ili ĉeeste spekti eventojn, kiel evidentiĝas de du tre malsimilaj historiistoj, kiuj ambaŭ citas (aprobe) la maksimon de la filozofo Heraklito, "la okuloj estas pli fidelaj atestantoj ol la oreloj". Polibio, kiu observis multajn (sed certe ne ĉiujn) eventojn, kiujn li rakontas, citas ĉi tiun maksimon inter kritikoj de sia antaŭulo Timajo. Polibio rimarkas kiel sufiĉis por Timajo akiri liajn sciojn el libroj; tial li ne povis fidele priskribi la eventojn kiujn li rakontis.[1] En la malfrua dua jarcento p.K. plaĉis al alia (sennoma) historiisto citi la maksimon: tiu verkisto el Korinto, tamen, nur tion faris por plivalorigi sian verkon. Tion ni scias dank'al Lukiano, kiu raportas ke ĉi tiu historiisto neniam forlasis sian naskiĝurbon (Korinton) dum sia tuta vivo, kio ne tamen malinstigis lin pretendi esti okulvidanto de la kampanjo de Avidio Kasio kontraŭ la Partoj. Sekve (inter aliaj aferoj) li kredis ke la serpentoj sur la standardoj partaj estas veraj besto, kiuj sukcesis damaĝi la romian armeon![2]

---

[1] Vd. Polibion, *Historio*, 12.27 kun la komentoj de F.W. Walbank, *Polybius* (Berkeley, 1968), p.72-4. La citaĵo el Heraklito troveblas en H. Diels kaj W. Kranz, *Die Fragmente der Vorsokratiker* (Berlin, 1974), 1.22 B 101a. Kp. ankaŭ herodoton 1.8 por la sama sinteno, leteron 11 de Juliano (389B) kaj Prokopion, *Anekdota* (Sekreta Historio), 1.20. Aldone, notu la gravecon de okulvido en la enkonduko de la *Eklezia Historio* de Sozomeno, 1.1 citita de J. Harries, "Sozomen and Eusebius: The Lawyer as Church Historian in the fifth century", en *The Inheritance of Historiography,* red. T.P. Wiseman kaj C. Holdworth (Exeter, 1986), p.46.

[2] Lukiano, *Kiel verki historion,* §29 pri tiu verkisto; kp. B. Bladwin, *Studies in Lucian* (Toronto, 1973), p.83 pri tio. Lukiano ankaŭ notas ke tiu historiisto (kiel Timajo) havis nenain ideon kio estas taĉmento aŭ truplisto, ĉar li neniam forlasis Korinton dum sia vivo. Kiel Lukiano rimarkas, tamen, lia aŭdantaro en Korinto bone sciis ke li ne okulvidis la militon.

Kaj estis klare al li, ke li aparte kompetentas verki historion de ĉi tiuj aferoj, se ne pro alia kialo pro la fakto ke, ĉar li elektiĝis la konsilisto de la generalo Belisario, estis lia sorto ĉeesti preskaŭ ĉiujn eventojn, kiu okazis. Tiel Prokopio pravigas sian decidon rakonti la progreson de la militoj de la imperiestro Justiniano kaj en la oriento kaj en la okcidento, aplikante la veron taŭgan al la verkado de historio - *sungrafe*.[3] Estas klara aserto de opinio ĝenerala inter la historiistoj de la antikva mondo, de Tucidico en la kvina jarcento a.K. ĝis Amiano Marcelino (kvara jarcento p.K.) kaj poste: Johano de Epifanio, verkante malfrue en la sesa jarcento p.K., laŭ maniero kiu multflanke sekvas tiun de Prokopio, servis, sammaniere kiel Prokopio, kiel konsilisto en lia kazo, la patriarkon Gregoron de Antioko.[4]

Evidente, do, okulvido ja gravis al la historiistoj de la malfrua romia imperio, kiujn oni kutimas nomi "klasikemaj" pro la fakto ke ili imitas la stilon de la klasikaj historiistoj kiaj Tucidico kaj Herodoto. Eblas distingi du manierojn esti okulvidanto de iu ajn evento. Unuflanke, la verkisto povas esti aganto, t.e. ĉefrolanto, en la koncernaj eventoj (probable en la antikva mondo, generalo aŭ/kaj politikisto); kaj aliflanke, li povas esti nur observanto, kiu ne havas decidpovon pri kiel direkti aferojn. Ekzemploj de la unua kategorio estas Tucidico mem, kiu estis atena generalo en 424 a.K., kaj Julio

[3] Prokopio, *Militoj* 1.1.3-5 pri la termon *sungrafeus/sungrafe*, kiun kontrastas Prokopio ĉi tie kun poezio kaj oratoraĵoj, vd. plej lastatempe la komentojn de J.F. Matthews, "The Origin of Ammianus", *Classical Quarterly* 44 (1994), p.263-7. pri Libanio kaj Amiano Marcelino. Notu ankaŭ la deziron de Prokopio persone vidi la insulon Tuleon (*Militoj* 6.15.8), kie li uzas la vorton *aŭtoptes* (okulvidanto).

[4] Tucidico 1.22.2 pri sia partopreno en eventoj, Polibio 12.25d-e, pri kio vd. supre n-1; Amiano 15.1.1 Johano de Epifanio, frg.1. en *Fragmenta Historicorum Graecorum* (ekde nun, *FHG*) red. C. Müller (Parizo, 1851), 4.273, pri kiu vd. M. Whitby, *The Emperor Maurice and his historian* (Oksfordo, 1988), p.222 kaj *The Prosopography of the Later Roman Empire* (ekde nun, *PLRE*), red. J. Martindale kaj aliaj (3 volumoj, Kembriĝo, 1970-92), vol.3, Ioannes 162. Pri la graveco de okulvido al historiografo en la malfrua romia periodo, vd. du kontribuaĵojn al *History and Historians in Late Antiquity*, red. B. Croke kaj A. Emmett (Sidnejo, 1983): N.J. Austin, "Autobiography and History: Some Later Roman Historians and their Veracity", p. 54-56, kaj J.F. Matthews, "Ammianus' Historical Evolution", p. 30-41, aparte p.38.





Cezaro; ankaŭ, en la malfrua antikva periodo, la sekvanto de Cezaro en Gaŭlo, la imperiestro Juliano, kiu verkis raporton pri sia venko je Strasburgo en 357 p.K. Ĝenerale, tamen, la generaloj de la malfrua romia imperio, ne estis literaturemaj homoj; male, ilin priskribas la kristana verkisto Laktantio kiel *iudices militares humanitatis litterarum rudes* (juĝistoj/estroj militistaj nespertaj pri la humaneco de literaturo). Aliaj estis soldatimperiestroj, kiaj Valentiniano kaj Valenso, kaj en la sesa jarcento p.K. generalo kiaj Belisario kaj Sitaso apenaŭ ŝajnas esti ricevintaj literaturan edukadon; estis eĉ unu generalo en la romia armeo en Italio, kiu, ŝajne, entute ne scipovis la latinan aŭ la grekan lingvon krom por diri sian propran nomon![5]

Ĝenerale la historiistoj klasikemaj estis observantoj. Sed necesas substreki ke ne mankis gravuloj, kiuj kapablis verki historiojn aŭ alian literaturaĵon: Petro la praticio, ekzemple, dum la regado de Justiniano, ellaboris plurajn verkojn, inter kiuj estis historio de la romia imperio ĝis la morto de Konstantino la dua. La diplomataro de la imperio aŭtoris kelkajn verkojn, kiuj inkluzivas la raporton de Petro pri lia ambasado al Persio, same kiel tiun de Nonoso, kiun oni sendis al suda Arabio. Alia ambasadoro al tiu regiono, Juliano, ankaŭ probable verkis raporton pri siaj vojaĝoj, kaj Zemarko, dum la regado de Justino la dua, eble eldonigis verkon pri sia misio en kiu li renkontis la Turkojn. Evidentiĝas tiel ke restis almenaŭ unu kampo, en kiu agantoj kaj verkistoj samhomis.[6]

[5] Laktantio, *De mortibus persecutarum*, 22.5 por la citaĵo; Amiano 31.14.5 pri la malklera Valenso, kun J.F. Matthews, *The Roman Empire of Ammianus Marcellinus* (Londono, 1989), p.238. Multaj generaloj estis laŭorigine "barbaroj", kiel ekz. Peranio el Iberio (hodiaŭa Kartvelio) en la sesa jarcento, pri kiu vd. *PLRE* 3, Peranius, kp. kun aliaj, kiaj Gainaso (*PLRE* 1, Gainas) en la kvara jarcento. Pri la generalo en Italio, vd. Prokopion, *Militoj* 7.26.24-7- la armena Gilakio.

[6] Pri Petro la patricio, vd. *PLRE* 3, Petrus 6 kaj *FHG* 4, 184-91 por la restantaj fragmentoj de lia verko. Vd. Menandron, *The History of Menander the Guardsman*, red. kaj tr. R.C. Blockley (Liverpolo, 1985), frg. 6.2.12-15 por lia rakonto pri lia ambasado. Pri Nonoso, vd. *PLRE* III, Nonnosus 1 kaj *FHG* 4.179; pri Juliano, vd. *PLRE* 3 Iulianus 8; pri Zemarko, vd *PLRE* 3, Zemarchus 3. Pri raportoj de diplomatoj ĝenerale, vd. la rimarkojn de A.D. Lee, *Information and Frontiers* (Kembriĝo, 1993), p. 39, kiu proponas ke Zemarko mem

Plie, akceptendas ke estis almenaŭ iuj generaloj, al kiuj plaĉis klasika kulturo: Rikomero estis amiko de la oratoro Libanio, dum en la mezo de la kvina jarcento p.K. Petro, la *magister epistolarum* de Majoriano, kiu verkis kaj prozon kaj poezion, ankaŭ servis kiel militista estro. Aldone, en la sesa jarcento p.K. al Aratio, la duko de Palestino, Korikio dediĉis panegiron. Sed aprezo de klasikstilaj verkoj postulas malsaman eduknivelon ol verkado; kaj neniu generalo (pri kiu ni scias) en la kvina aŭ sesa jarcento p.K. verkis komentarion pri siaj propraj kampanjoj.[7]

Inter la antaŭuloj -kiel observantoj- de la klasikemaj historiistoj estas Polibio, kiu havis la bonan ŝancon akompani Skipionon Emilianon, ekzemple dum la romia atako kontraŭ Numantio. Pli fruan ekzemplon konsistigas Teopompo, kiu, laŭ Dionisio de Halikarnaso, "estis okulvidanto (*aŭtoptes*) de multaj eventoj kaj parolis kun multaj el la homoj, kiuj tiam elstaris en la kampo de milito, politiko kaj filozofio pri sia verko."[8] En alia artikolo, mi konsideris kial pligrandiĝis la nombro da tiaj histroiistoj en la malfrua romia imperio, kaj argumentis ke estas grava ligo inter histori-verkado kaj juro en tiu periodo: tiuj, kiuj fariĝis historiistoj, originante inter la urbelitoj de la orienta imperio, ricevis "klasikan" edukadon (kiu donis al ili firman konon de la klasikaj historiistoj), kaj poste juran trejnadon. Tia edukado tre taŭge pretigis ilin por servi inter la romia burokrataro, kaj tiel eskapi la

eldonis raporton pri sia ambasado; vd. ankaŭ B. Baldwin, "Greek historiography in Late Rome and Early Byzantium", *Hellenika* 33 (1981), p. 63.

[7] Kvankam almenaŭ unu klopodis verki pli malpezajn liberaturaĵojn -Flavio Merobaŭdo, pri kiu vd. *PLRE* 2, Merobaudes kaj F. Clover, "Flavius Merobaudes. A translation and historicla commentary", *Transactions of the Amercian Philosophical Society* n.s. 61.1 (1971), p.7-10. Pri Rikomero, vd. *PLRE* 1, Richomer; pri Petro, *PLRE* 2, Petrus 10; pri Aratio, *PLRE* 3, Aratius -temas pri *Oratoraĵo* de Korikio. Johano lidia asertas ke, "viro ne elektiĝis imperiestro krom se li elstaris pro sia edukado en ambaŭ kampoj (literatura edukado kaj militado)", kiam li pritraktas Konstantinon la Unuan, *De Magistratibus* 3.33. Justino la Unua, aliflanke, kiu servis kiel generalo sub la imperiestro Anastasio, eble estas pli taŭga reprezentanto de ĉi tiu malfrua periodo, "estis homo nesperta pri (politikaj) aferoj kaj sciis absolute nenion krom kiel militi (kion li akiris per sperto), Johano lidia, *De Mag.* 3.51.

[8] Pri Polibio, vd. Walbank, *Polybius,* p.11-13. Pri Teopompo, vd. C.W. Fornara, *The Nature of History in Ancient Greece and Rome* (Berkeley, 1983), p.49 kiu citas Dionision, *Ad Pomp.* 6 = *FGrHist* 115 T 20a (vol. 2b, p530.20-22).





pezajn ŝarĝojn de ofico-tenado en iliaj naskiĝurboj, per kiu li esperis kapti la atenton aŭ de la imperiestro aŭ de alia grava funkciulo en la imperia korto.[9] Ĉi tie estas mia intenco pli detale trakti unu flankon de tiu fenomeno, ĉar evidentiĝas ke multaj historiistoj de la malfrua romia imperio ne nur estis juristoj, sed eĉ samoficohavantoj ili estis *assessores,* termino kiun mi kutime tradukas per la vorto "konsilisto".[10] Kia posteno ĝi estis? Ĉu necesis esti juristo por teni ĝin? Ĉu ĝi ŝanĝiĝis dum la jarcentoj?

Ekde la respublika periodo, romiaj ofico-havantoj sin turnis al *consilium* (konsilantaro) por konsiloj, aparte en gravaj kazoj. Tiel, laŭ Valerio Maksimo, Lukio Gelio konsilantigis la tutan senaton kiam li juĝis sian filon.[11] Kiel dum la imperiestra periodo, ofico-havanto honoris homon, se li vokis tiun servi en sia konsilantaro; kaj ne necesis ke tiu havu juran scion. La kvanto da invitatoj variis multe, samie kiel ilia statuso: Cicero riproĉas Vereson pro la malalta statuso de tiuj kiujn li invitis servi en sia *consilium.*[12] La imperiestro Domitiano, estas klare, konsilantigis kaj kavalirojn (*equites*) kaj senatanojn kiam li prijuĝis kazon inter la Falernianoj kaj Firmanoj. Tamen la konsiloj de la konsilantoj (*consilarii*) neniel limigis la decidrajton de la ofico-havanto.[13]

[9] Vd. G. Greatrex, "Lawyers and historians in late antiquity" en *Shifting Frontiers II. The Transformation of Law and Society in Late Antiquity,* red. R. Mathisen (aperonta en 1998/9). Tiaj gravuloj ja patronis plurajn verkojn dum ĉi tiu periodo.

[10] Vd. ankaŭ sube n. 22 pri ĉi tiu traduko.

[11] Vd. H.F. Hitzig, *Die Assessoren der Römischen Magistrate und Richter* (Munkeno, 1893), ĉap. 1 pri la *consilium* ĝenerale, p.5 pri Lukio Gelio; li citas Valerion Maksimon 5.9.1.

[12] Cicero, *In Verrem,* 2.29.71s., aparte 75.1s, kiel notas Hitzig, *Assessoren,* p.13 n.44. La listo de tiuj, kiuj *in consilio fueront* al Pompeo Strabono en 88 a.K. estas multe pli elstara, ŝajne inkluzivante kaj la junan Pompeon kaj Katilinon, vd. *ILS* 8888.

[13] Pri la rango de *consilarii,* vd. Hitzig, *Assessoren,* p.12-13, la saman verkon, p.13, pri la statuso de iliaj konsilioj, kp. A. Berger *Encyclopaedic Dictionary of Roman Law, Transactions of the American Philosophical Society,* n.s. 43 (1953), p. 351. Pri la kazo de Domitiano, vd. *CIL* IX 5420 = M. McCrum kaj A.G. Woodhead, *Select documents of the Principates of the Flavian Emperors* (Oksfordo, 1961), no. 462=R.K. Sherk, *The Roman Empire: Augustus to Hadrian* (KembriĜo, 1988), no. 96 (angla traduko), kp. ankaŭ F. Millar, *The Emperor in the Roman World,* ekde nun *ERW* (Londono, 1977), p. 120, pri tio kaj aliaj ekzemploj (el Diono Kasio) de imperiestroj kaj iliaj konsilantoj.

Du ekzemploj el tiu frua periodo pliklarigos la rolon de la *consilium*. Unu fontas en la mallonga regno de Otono: en marto 69 p.K. prokonsulo finsolvis longdaŭran disputon en la insulo Sardinio. Je la fino de la epigrafo troviĝas listo de ok homoj, kiuj *in consilio fuerunt* (estis en la konsilantaro).[14] Pli konatan ekzemplon provizas la pli juna Plinio. Evidentiĝas en liaj leteroj, ke li servis en la *consilium* ne nur de Trajano, kiam li juĝadis en Centumcellae (Kentumkelaj), sed ankaŭ de la urboprefekto. Pri la lasta tasko, li priskribas kiel plaĉis al li aŭskulti tiujn, kiuj parolis nome de la du partioj en la koncerna kazo: kiel konsilanto (*consiliarius*) li sidiĝis kun la ofico-havanto, kiu prijuĝis la kazon.[15]

En la dua jarcento p.K. iom ŝanĝiĝis la rolo de konsilantoj. La preciza dato de tiuj ŝanĝoj ankoraŭ disputiĝas, sed plej frue ili okazis sub Hadriano (117-138 p.K.). Ekvideblas konstanta konsilantaro de la imperiestro (*consilium principis*), eble dum la regado de Marko Aŭrelio (161-180 p.K.); antaŭe, kontraste, imperiestro aŭ ofico-havanto vokis *consilium* nur kiam tiun li bezonis. Aldone, konsilantoj nun ricevas salajron, kaj -laŭ iuj esploristoj-, la termino *assessor* ekuziĝas. Daŭradis la malnova konsilantaro (*consilium*), tamen: aliajn, krom la *assessor*, oni rajtis inkluzivi en la konsilantaro, kaj tiu organizo ne ĉesis funkcii. Sed la konsilisto (*assessor*) baldaŭ evoluigis pli gravan rolon, kaj ne

[14] *ILS* 5947 = McCrum-Woodhead, no 455 = B. Levick, *The Government of the Roman Empire a sourcebook* (Londono, 1985), no 50 (traduko kun iuj komentoj), kaj kp. Hitzig, *Assessoren*, p 23 B Kübler, en sia rubirko pri "adsessor", citas la ekzemplon de C Trebatius Testa, konata el la leteroj, kiujn sendis Cicero al li kaj al Julio Cezro (Cic. *Ad Fam* 7.10ff), *Reallexikon für Antike und Christentum* 1 (1950), 804; sed kvankam Trebatio evidente estis advokato, kaj servis Cezaron en Gaŭlo havante ian oficon, oni ne nomas lin *consiliarius*

[15] Plinio, 6 11 (*praefectus urbi*), *ep* 6 31 (Trajano) kun la komentoj de A N Sherwin-White, *Pliny's letters A social and political commentary* (Oksfordo, 1966), p 107, notante aliajn kazojn kiam Plinio plenumis ĉi tiun rolon, kaj la plendojn de Seneko pri kiom da tempo tiel forrabiĝas, *De brevitate vitae Or 10*, 7 7 Vd. ankaŭ Hitzig, *Assessoren*, p 22 pri *Ep* 6 11, p 32 pri 6 31, p 20-9 ĝenerale diskutas konatajn ekzemplojn de *consiliarii* de diversaj ofico-havantoj





nur sidis kun la ofico-havanto kiam li prijuĝis kazojn.[16]

Antaŭ daŭrigi nian konsideron de la evoluado de tiu posteno en la malfrua romia imperio, necesas iom konsideri la diversajn terminojn, kiuj ĝin referencas, en la latina kaj la greka lingvoj. En la malfrua periodo, la latinaj terminoj *consiliarius* kaj *assessor* ekvivalentiĝis, dum la grekaj vortoj *paredros* kaj *sumbulos* fariĝas la plej kutimaj tradukoj. Diono Kasio, diskutante la regadon de provincoj apertenantaj al la senato, klarigas ke la termino *paredreŭontes* preferas al *presbeŭtaj*: kiu lasta, laŭ li, aplikiĝas nur al *legati*.[17]

En la malfrua romia periodo ĉiu ofico-havanto posedis sian konsiliston. Tial la *quaestor sacri palatii* (kvestoro de la sankta palaco), efektive la jura konsilisto aŭ *paredros* de la imperiestro, ne havis tian.[18]

[16] Hitzig, *Assessoren*, p. 33-47, atribuas la ŝanĝon al Hadriano, kp. ankaŭ F. Millar, *The Roman Empire and its neighbours*, dua eldono (Londono, 1981), p.59-60 pri ĉi tiuj evoluoj. Kontraŭ Hitzig, vd. J.A. Crook, *Consilium Principis* (Kembriĝo, 1955), p.56-65 pri Hadriano, kaj p. 73 pri salajrataj *consilarii* sub Marko Aŭrelio. Ŝajnas ke en la malfrua dua jarcento p.K. oni komencis pagi salajron al *assessores*; sed nur en la frua tria jarcento la ŝtato ekrespondecis pri tiu pago. Vd. W. Kunkel, *Herkunft und soziale Stellung der römischen Juristen*, dua eldono (Graz-Vieno-Kolonjo, 1967), p. 332-3 kun O. Behrends, "Der *assessor* zur Zeit der klassichen Rechtswissenschaft", *Zeitscrhift der Savigny-Stiftung für Rechtsgeschichte* 89 (1969), 217-18. Laŭ Hitzig, la termino *assessor* ne uziĝas ĝis la regno de Hadriano, *Assessoren*, p. 38-41, sed Behrends, "Der *assessor*", p. 194-9, konvinke argumentas ke la termino troviĝis jam dum la malfrua respublika periodo.

[17] Por plena listo de la diversaj eblaj terminoj. vd. Hitzig, *Assessoren*, p. 124-5; anoj de la *consilium* de la imperiestro oni neniam nomis *assessores* aŭ *paredroi*. Pri Diono (53.14.5) vd. Hitzig, *Assessoren*, p. 24. Necesas ankaŭ noti ke oni ankaŭ uzis la grekan vorton *sunkathedros* por traduki la latinan *assessor*, pri kio vd. R. Kotansky, "Magic in the court of the Governor of Arabia", *Zeitschrift für Papyrologie und Epigraphik* 88 (1991), p 47-8.

[18] Hitzig, *Assessoren*, p 49 kaj 181-2 (notante la kritikojn de Prokopio kontraŭ la kvestoro Junilo pro lia scimanko pri la juro, *Anecdota* 20 17 [kp 20 21]), kp A Demandt, *Die Spätantike* (Munkeno, 1989), p 235-6 kaj T Honoré, *Tribonian* (Londono, 1978), p 8-9 Notu aldone Kasiodoron, *Variae*, ed T Mommsen, *MGH AA* XII (BERLINO, 1894), 6 5 4-5 "juro socio kaj singardaj paroloj devas lin (la kvestoron) akompani ... Aliaj oficoj ja eble petas la helpon de juraj konsilistoj, sed via donas siajn konsilojn al la princo" Vd ankaŭ J. Harries, "The Roman Imperial quaestor from Constantine to Theodosius II", *Journal of Roman Studies* 78 (1988), p 148, pri la graveco de elokvenco al la kvestoro

Kvankam oni atendus ke la kvestoro estu kapabla juristo li mem, ne sekvas, ke spertaj juristoj havante aliajn oficojn ne vokus siajn proprajn konsilistojn: ĉiam bonveniĝis konsiloj, kaj Papiniano mem, ni scias, kunvokis *assessores*.[19] Necesas nun pliklarigi kian rolon plenumis la konsilisto (*assessor*), kiom grava estis lia posteno, kaj finfine konsideri iujn specimenajn konsilistojn.

Unue, la rolo de *assessores*. La mallonga ero en la Digesto, *De Officio Adsessorum* (Pri la ofico de konsilistoj) enhavas la jenan klarigon (22.1, Paŭlo)

> Ommne officium assessoris, quo juris studiosi partibus suis funguntur, in his fer causis constant: in cognitionibus, postulationibus, libellis, edictis, decretis, epistolis.

> La tutan oficon de *assessor*, en kiu tiuj, kiuj estas spertaj pri la juro, plenumas siajn taskojn, konsistigas la jenaj kazoj: juraj enketoj, petoj, aktoj, ediktoj, dekretoj kaj leteroj.[20]

Sen detala konsidero de ĉiuj ĉi tiuj taskoj, estas klare ke oni atendas ke la konsilisto posedu scion pri la juro. Evidentiĝas, tamen, en la *Novellae* (Novaj Leĝoj) de Justiniano, ke ne ĉiuj konsilistoj havis tian scion, ĉar la imperiestro sentis la bezonon postuli ke *paredroj* (la greka ekvivalento de *assessores*) ne rajtu enposteniĝi krom se ili unue ekzameniĝas.[21] Kiel en la pli frua periodo, la elekto de la konsilisto

[19] Kp. Hitzig, *Assessoren*, p.52, kiu notas ke se ofico-havanto ne konsultus iun ajn, tio povus indiki troan memfidon.

[20] Por klarigo pri la terminoj uzita, vd. Behrends, "Der *assessor*" p.214-15.

[21] Justiniano, *Novella* 82.2 (539 p.K.) kun Hitzig, *Assessoren*, p.66-82 Ekzemplojn oni notos sube.





estis en la manoj de la ofico-havanto. Tial tiu ne estis ano de iu *officium* (oficistaro). Malkiel konsilantoj antaŭe, tamen, la konsilistoj ja ricevis salajron de la ŝtato.[22] Dank' al la *Novellae* kaj Kodekso de Justiniano, eblas mallonge prikomenti tiun salajron. La plej multaj konsilistoj ricevis unu(romian) funton da oro (kio egalas al 72 *solidi* [oraj moneroj]) kiel jaran salajron, dekonon de la provincestroj, kiujn ili servis. Kelkaj ricevis duoble pli ol tio (kiel, ekzemple, tiu de la *moderator Arabiae*), kio eble ligiĝas kun la fakto ke en tiuj provincoj la provincestro zorgis pri kaj la milita kaj la civila branĉoj de la administrado. Konsilistoj de pli altaj ofico-havantoj ricevis pli grandan salajron: tiu de la prefekto de Egiptio perlaboris kvin funtojn da oro, dum tiu de la pretora prefekto en Afriko ricevis dudek.[23]

La leĝdonado de pluraj imperiestroj bildigas la potencan pozicion de *assessores*. Oni ne permesas ke ili subskribu aktojn, nek ke ili enposteniĝu en ilia naskiĝprovinco, nek ke ili prijuĝu kazojn propranome. Justiniano leĝdonis por eviti la eblan intereskonflikton inter esti praktikantaj juristo kaj samtempe jura konsilisto al la juĝisto,

[22] Pro tio -la pago de salajro- estas preferinde uzi la terminon konsilisto por ili, kontraste al la konsilantoj pli frua. Samtempe, rilate terminojn, notindas ke en la pli frua romia periodo, kiel vidite, ne necesis ke konsilantoj havu juran scion; sed poste, tia scio ja bezoniĝis, kio plipravigas la uzon de la -isto termino en tiu kazo. Substrekindas la fakto ke la ofico-havanto mem elektis sian konsiliston, kaj, kvankam tiu ricevis ŝtatan salajron, li ne estis parto de la imperiestra burokrataro; tion montras, ekzemple, la fakto ke la informplena dokumento la *Notitia Dignitatum* (listo de ĉiuj oficoj en la imperio) nenie mencias iun ajn *assessor*. Vd. Behrends, "Der *assessor*", p.219.

[23] Por ĉi tiuj ciferoj, vd. Hitzig, *Assessoren*, p.132-44, A.H.M. Jones, *The Later Roman Empire* (ekde nun *LRE*) (Oksfordo, 1964), p.500-1 kaj M.F. Hendy, *Studies in the Byzantine Monetary Economy, c.330-1453* (Kembriĝo, 1985), p.178 kaj 181, kaj vd. la ciferojn por la salajroj de gramatikistoj kaj oratoroj en R. Kaster, *Guardians of Language: The grammarian and society in Late Antiquity* (Berkeley, 1988),p.117-8 (proks. duono, kp.Codex Justinianus (Kodekso de Justiniano, ekde nun *K.J.*), 1.27.1.42). Por Egiptio kaj Afriko, la cifero por la tuta salajro dependas je ĉu oni kredas ke temis pri unu aŭ du konsilistoj mi sekvas Hitzig, *Assessoren*, p.88-92, kiu supozas ke estis nur unu, sed Jones, *LRE*, p.501, opinias ke estis du en Afriko (vd.*K.J.* 1.27.1.21, kun la noto de Hitzig, *Assessoren*, p.91). Hitzig, *Assessoren*, p.144, proponas ke salajroj eble estis pli altaj antaŭ la regado de Anastasio kaj Justiniano.

kaj li ankaŭ malpermesis ke iu estu la *assessor* de du homoj samtempe.[24] Nesurprizinde homoj tentiĝis subaĉeti tiom influhavan ofico-havanton, sed tion klare kontraŭis *Kodekso Justiniana* I.53. Aldone, oni malrajtigis konsilistojn edziĝi dum ilia ofico-periodo: Gregoro de Nazianzo priskribas kiel *assessor* strebis peforte edzinigi ĵus vidviniĝintan kristanan virinon.[25] La leĝoj ankaŭ nin informas pri la avantaĝoj de la ofico. Dum konsilistoj enoficis, ili estis imunaj kontraŭ la devoj de kuratoreco kaj de lokaj impostoj. Tiujn privilegiojn ili posedis pro sia *publica sollicitudo* (publika laboro), kvankam ili ne apartenis al *officium* (oficistaro).[26] Plie, la oficon de konsilisto Libanio nomas *sperma pros arkhen* (semo al povo): por tiu, kiu havis la oficon, ĝi estis grava etapo survoje al pli altaj oficoj, ekzemple estreco de provinco aŭ konsilisteco de pli grava ofico-havanto. La altan statuson de *assessores* al *illustres* (la plej altrangaj homoj en la imperio), ekz. la pretora prefekto, montras la leĝo de la jaro 413, el kiu evidentiĝas ke ili ĝenerale ricevis la titolon *comes primi ordinis* (grafo unuaranga) kiam ili emeritiĝis, kaj tiel ili estis samrangaj kun vikarioj.[27]

[24] *K.J.* I.51.2 (*libello*; 320 p.K.), 51.13 (ne rajtas prijuĝi kazojn ili mem, 487 p.K.), 51.14 (ne rajtas esti advokato kaj *assessor* samtempe kaj ne rajtas esti *assessor* de du homoj samtempe, 529 p.K.). Kp. Hitzig, *Assessoren*, p.145-54, kiu priparolas ĉi tiujn (kaj aliajn) limigojn. Li ankaŭ notas kiom Justiniano emfazas la neceson ke konsilistoj havu "purajn manojn", *Nov.* 17.5,80.8,82.9.

[25] Hitzig, *Assessoren*, p.146-7, pri la edzinigo; Gregoro de Nazianzo, *PG* 36.568 pri ĉi tiu epizodo.

[26] Tiel Hitzig, *Assessoren*, p.144, citante *K.J.* 1.52 (titolo); kp. ankaŭ *K.J.* 1.51.11 (444 p.K.) pri aliaj privilegioj de konsilistoj de la pretora prefekto kaj aliaj gravaj ofico-havantoj.

[27] Libanio, *Or* 33.5 (ed. Förster, vol.3,p167). Pri la eblaj karieroj, al kiuj la posteno de konsilisto povis konduki, vd. Hitzig, *Assessoren*, p.80, 186-7, kaj kp. Kaster, *Guardians of Language*, 124 n.133. Jones, *LRE*, 501 kaj 1213 n.70, pri la rango de *assessores* (Codex Theodosianus 6.15.1 (413 p.K.)). Notu ankaŭ la karieron de Florido (en *PLRE* 2, sub Floridus kaj Hitzig, *Assessoren*, p.193 kaj 198), kiu estis *consularis* en Ligurio kaj poste (probable) *assessor* al la urba prefekto en Romo - ĉar tio donis al li la rangon *spectabilis*, kio estis super tiu de provincestroj.





*Assessores* estis ne nur juraj konsilistoj: ili estis, efektive, la leŭtenantoj de la provincestroj. Libanio priskribas konsiliston kiel iu, kiu estas *kojnonos hapanton* (dividas ĉion), kaj Justiniano notas la manieron, laŭ kiu ili helpis la provincestron trakti amason da laboro.[28] Ero el la *Eklezia Historio* de Eŭsebio ilustras ilian gravecon jam unu jarcenton antaŭ Libanio; ĝi fontas en letero de Dionisio, episkopo de Aleksandrio, al lia kolego Fabio, episkopo de Antioko:

> Tiuj sanktaj martiroj el inter ni, kiuj estas nun la konsilistoj de Kristo, dividantaj lian juĝadon, kaj kunjuĝantaj kun li...[29]

Dankon aŭ malamon perlaboris ne nur la provincestro, sed ankaŭ lia konsilisto; kaj tiu lasta ankaŭ devis resti en la provinco, kiel li enoficis, dum kvindek tagoj post sia eksiĝo kiel ofico-havanto. Se la kariero de ofico-havanto ŝanceliĝus, same probable okazus al lia konsilisto.[30] Bonan *ekzemplon* de la firma kunlaboro inter ofico-havanto kaj lia *assessor* provizas la kazo de Tisameno, viktimo de oratoraĵo de Libanio. Laŭ Libanio, al tiu entute mankis juraj scioj; la konsilisto nur kundiboĉadis kun la generalo, kiun li servis. Tamen, se konsilistoj ĝenerale tiom malkompetentis kiom asertas Libanio pri Tisameno, la plendo de Laktantio -ke malklerajn kaj perfortajn armeajn juĝistojn oni elsendis por regi la provincojn, *sen konsilistoj*- ŝajnus iom stranga. Pli laŭdinda ekzemplo de laboranta konsilisto estas Prokopio. Kiel Tisameno, li evidente havis bonajn rilatojn kun la generalo, kiun li servis, kiel montras lia ĉeesto en la ĉefŝipo survoje al Afriko kaj pluraj

[28] Libanio, *Or* 52.25 (red. Förster vol.4.,p.37); Justiniano, *Nov.*82 praef (539 p.K.), kie li ankaŭ notas la mankon de juraj scioj inter *assessores*.

[29] *HE* 6.42.5, citita de Millar, *ERW*, p. 110 kaj n.4 (el la 250aj jaroj)

[30] Hitzig, *Assessoren*, p.123 kaj 151, pri tio, citante la malamon, kiun altiris Lukiano kaj lia *assessor* (en 393), laŭ Libanio, *Or* 56.21 (red. Förster,vol.3, p.142); kp. la monpuno de Romano, la *comes per Africam* kaj lia *assessor*, Caecilius (Kajkilio) (Amiano Marcelino 28.6.11, 28, 29), kaj kp. la sorton de Frontino (Amiano 28.1.21), *assessor* de Himetio. *CJ* 1.51.3 (403 p.K.) pri la devo resti en la provinco dum 50 tagoj.

aliaj detaloj en lia verkaro. Krome, memorante la fakton ke Paŭlo menciis ke inter la taskoj de *assessor* estas la verkado de leteroj, povas esti ke iuj leteroj de Belisario raportitaj en la *Militoj* de Prokopio estas versioj de tiuj unue verkitaj de la historiisto por oficiala uzo.[31]

Kiun oni do elektus kiel *assessor*? Estas klare ke juristo pli taŭgus ol aliaj, sed la kazo de Tisameno implicas ke (en la kvara jarcento) ne nepre necesis posedi jurajn sciojn. Alia ekzemplo citeblas tiurilate. Amiano Marcelino rakontas pri iu Flavio Simplikio, kiu fariĝis vikario de Romo en 374-5 p.K. Antaŭe li servis kiel la *consiliarius* de Maksimino, la provincestro de Korsiko, Sardinio aŭ Etrurio. Ĉar Maksimino lin priskribas kiel *ex grammatico* (eks-profesoron), ŝajnas ke ankaŭ li ne jure edukiĝis, kvankam tio neniel bremsis lian postan karieron.[32] Pro tiuj du kazoj, kaj memorante la ordonon de Justiniano pri la neceso ekzameni tiujn, kiujn oni elektis konsilistoj, oni rajtas

[31] Tisameno: Libanio, *Or.*33.4 (red. Förster, vol.3,p.166-7), kun Hitzig, *Assessoren*, p168 pri li kaj *PLRE* 1, Tisamenus. Laktantios, *De mortibus persecutorum*, 22.5 por liaj kritikoj. Pri Prokopio, vd. *Militojn* 3.12.3, eron notitan de Hitzig, *Assessores*, p.97. Vd. supre la tekston al n.20 pri la devo rilate al *epistolae* (leteroj). Kp. ankaŭ la rolon de kvestoroj en la preparado de leĝoj, Harries, "The imperial quaestor", p.149-53. Hitzig, *Assessores*, p.97, eraras, tamen, kiam li supozas ke Olimpio estis konsilisto de la *consularis Syriae* en la *Aŭtobiografio* de Libanio (§170). Ĉar la *consularis* elektis sian propran *assessor*, li apenaŭ estos elektinta tiom neflekseblan ulon kia Olimpio, kiu malebligis ke li skurĝe punu du studentojn de Libanio. Olimpio male estis inter la nobeloj de la urbo, kiuj rajtis kunsidiĝi kun la *consularis*, vd. Jones, *LRE*, p.503 pri ili, kaj la plendoj de Libanio pri ili en alia kunteksto, *Or.*42.4 (red. Förster, vol.4, p.27). Malkiel la kvestoroj de la palaco, estas malprobable ke ili povis iel ajn bremsi ofico-havanton, malgraŭ Hitzig, *Assessoren*, p.53; kvestoroj, kiaj Prokulo (Prokopio, *Militoj* 1.11.19-24) jo povis malkonsenti kun imperiestroj, kp. Kasiodoron, *Variae* 6.5.5

[32] Amiano 28.1.45 pri Simplikio (de Emono), kun *PLRE* 1, Flavius Simplicius 7; ankaŭ Matthews, *Ammianus*, p.211, Hitzig, *Assessoren*, p.193, kaj Kaster, *Guardians of Language*, p. 124-5 kaj 359. Kaster proponas, tamen, ke Simplikio eble kombinis advokatecon kun sia instruado, kaj kompras lin tiurilate kun Aŭsonio de Bordozo, p.124. Pri Maksimino, vd. *PLRE* 1, Maximinus 7: Amiano 28.1.6 raportas lian nur mezbonan kapablon kiel advokato. Matthews, *Ammianus*, p.272, pri lia patronado de Simplikio.





konkludi ke ne ĉiu *assessor* ricevis juran trejnadon.[33]

Ĝenerale, tamen, la *assessores*, kiujn ni konas estus juristoj. Pli probable, kompreneble, oni elektis juristojn por servi ofico-havanton, sed necesas atentigi pri la graveco de sanligoj kaj patronecligoj. La promocion de Simplikio al lia posteno oni povas klarigi per la patroneco de lia samlandano Maksimino, kaj indas noti ke kelkfoje oni promociis eĉ tre proksimajn parencojn. La plej malobskurajn kazojn oni trovas en Italio dum la sesa jarcento, kie la juna Kasiodoro servis sian patron kiel *consiliarius* iam inter 503 kaj 507. Tamen, ĉar Teodoriko poste lin nomis kvestoro de la palaco, priskribante lin kiel *conscientia praeditum et legum eruditione maturum* ("dotitan de konscienco kaj matruan en lia erudicio pri leĝoj"), probablas ke, malgraŭ lia juna aĝo, li jam estis ricevita juran edukadon.[34] Alia ekzemplo estas Cipriano, la *comes sacrarum largitionum* (grafo de la sanktaj disdonoj) en Italio inter 524 kaj 525, kiu elektis sian fraton Opilion por servi lin kiel ia konsilanto, probable kiel *consiliarius* . Sed kvankam tio estas plia evidenta kazo de nepotismo, ni scias ke Opilio ja antaŭe agis kiel advokato.[35]

[33] Vd. supre n.21 pri Justiniano; kp. Hitzig, *Assessoren*, p.81-2, pri la demando pri juraj scioj, kun Jones, *LRE*, P.387. Kp. P. Brunt, *Roman Imperial Themes* (Oksfordo, 1990), p.232, kiu, pri la periodo sub la Severaj imperiestroj, notas ke ne ĉiuj *assessores* estas fakuloj pri la juro (*iuris consulti*). Sed Amiano evidente atendis ke *assessores* ĝenerale havu juran edukon, vd. 23.6.82: persaj ofico-havantoj ne bezonus konsilistojn *unde nostram consuetudinem rident, quae interdum facundos, iurisque publici peritissimos, post indoctorum collocat terga* (tial ili mokas nian kutimon, kiu kelkfoje lokigas elokventajn homojn, lertajn pri publika juro, malantaŭ la dorsoj de malkleraj juĝistoj)

[34] Vd. *PLRE* 2, Cassiodorus 3 kaj 4 pri ĉi tio; la pli maljuna Kasiodoro estis prefekto de Italio, kiam lin konsilis lia filo. Vd. ankaŭ S.J.B. Barnish, *Cassiodorus. Variae* (Liverpolo, 1992), p.xxxix, kaj Hitzig, *Assessoren*, p.195, pri la enoficiĝo de Kasiodoro.

[35] Hitzig, *Assessoren*, p.195, lion proponas, sed *PLRE* 2, Opilio 4 ne priskribas lin kiel la *consiliarius* de lia frato, *Cyprianus* 2. La vortojn de Kasiodoro, *Nam militiae ordinem sub fraterna laude didicisti; ciu mutuo conexus affectu implebas laboribus socium et consiliorum participatione germanum* ("Vi lernis burokratan sistemon per la laŭdo de via frato, kaj, ligita al li per reciprokaj sentoj, vi plenumis la rolon de kolego en liaj laboroj kaj kunfilo per partoprenado en liaj diskutoj", *Variae* 8.16) - Hitzig interpretas kiel aludon al la posteno de *assessor*. Pri liaj agadoj kiel advokato, vd. *Variae* 8.16-17.

Finfine, ekzistas kazoj de *assessores*, kiujn oni elektis pro ilia jura scio, aŭ, kio eble estis pli ofta, pro ilia oratora kapablo.[35] Nun oni ekzamenos iujn karieriojn por pli lumigi la rolon de konsilistoj. Bonan ekzemplon de promocio de advokato al konsilisto provizas Ambrozo, kiu rapide elektiĝis al la ofico de *consularis Aemiliae et Liguriae* en 374 antaŭ ol kreiĝi episkopo de Milano. Indas plene citi priskribon de lia frua kariero, kiun donas lia biografio Paŭlino:

> sed postquam edoctus liberalibus disciplinis ex urbe egressus est professusque in auditorio praefecturae praetorii, ita splendide causas perorabat ut eligeretur a viro ilustri Probo, tunc praefecto praetorii, ad consilium tribuendum.

Post eduko en la liberalaj artoj, li forlasis Romon, praktikis juron ĉe la tribunalo de la pretora prefekto. Tiom impone li pledis siajn kazojn ke lin elektis la *vir illustris* Probo, tiam la pretora prefekto, por lin konsili.[37]

Tre proksiman paralelon, kvankam iom malamikan, oni trovas en la frua kariero de Maksimino, kiel priskribite de Amiano:

> Is [Maximinus] post mediocre studium liberalium doctrinarum defensionemque causarum ignobilem, et administratas Corsicam itidemque Sardiniam, rexit deinde Tusciam.

[35] Kasiodoro, *Variae*, 8 1 2 estas interesa atestaĵo, estante letero de elektiĝo al Aratoro, kiu fariĝas la *assessor* de la generalo Tuluino, vd la komentojn de Barnish, *Cassiodorus Variae*, p xxxx. La opinio de Barnish, verko citita, 104 n 9, ke temas ĉi tie pri la postmo de *assessor* kaj ne alia pli konvinkas ol tio de *PLRE* II, Arator. Notu ankaŭ la opinion de Harries, "The imperial quaestor", p 160, ke elokventeco estis la "ĉefa kompetentiĝo" por la oficoj de *quaestor sacri palatii* kaj *magister memoriae* (anstataŭ juraj scioj)

[37] Paŭlino, *Vita Ambrosii*, 5 1, kp *PLRE* 2, Ambrosius 3





> Maksimino, post ioma studado de la liberalaj artoj kaj post senglora kariero kiel advokato, estris Korsikon kaj Sardinion, kaj poste Tuskion (Toskanion).[38]

Maksimino, malgraŭ sia averaĝeco, sukcesis administri provincojn sen servi kiel *assessor* iam ajn. Sed substrekendas la komuna eduka fono de Ambrozo kaj Maksimino. Unue venas la *studia liberalia*, kiujn sekvas advokata kariero. La juna advokato pledas ĉe tribunalo, esperas kapti la atenton de alta ofico-havanto, plej probable provincestro aŭ generalo; kaj, se li bonŝancas, tiu ofico-havanto lin elektas sia konsilisto. Notindas kelkaj aliaj kazoj. Flavio Severo, pri kies kariero nin informas oratoraĵo de Simako (de la jaro 376/8), servis dum pluraj jaroj kiel advokato antaŭ ol elektiĝi *praeses* (estro) de afrika provinco. Post sukcesa plenumo de tiu ofico, lin vokis esti konsilisto Teodosio, la patro de la imperiestro Teodosio, dum sia kampanjo kontraŭ Firmo en Afriko en 374/5.[39] Alipio, la amiko de Aŭgustino, studis juron en Romo, kaj servis kiel *assessor* trifoje. Iom poste, estas la kazo de la advokato Justiniano, kiu en 408 estis la *sumbulos* kaj *proedros* de Stiliko; antaŭe, laŭ Zosimo, li elstaris en la tribunaloj en Romo. Li strebis malebligi la falon de Stiliko, sed kiam evidentiĝis ke tio estas senespera tasko, li fuĝis, ne dezirante implikiĝi en la sorto de sia patrono.[40] Finfine, alia probabla advokato, kiun oni vokis por fariĝi *consiliarius* estas Pragmatio, konata pro lia oratora kapablo: kiam lia bopatro, Prisko Valeriano, enoficiĝis kiel pretora prefekto de Gaŭlo en la mezo de la kvina jarcento, li nomis Pragmation sia konsilisto, laŭ Sidonio Apolinario.[41]

[38] Amiano 28.1.6; vd. supre n.31 pri Maksimino. N.B. McLynn, *Ambrose of Milan. Church ad Court in a Christian Capital* (Berkeley, 1994), p.37-9, komparas la samajn karierojn.

[39] Vd. Hitzig, *Assessoren*, p. 196 *PLRE* 1, Severus 24, Symmachus, *Or.* 6 en *MGH AA* VI.1, ed. O. Seeck (Berlino 1883).

[40] Pri Alipio, vd *Alypius* 8 Pri Justiniano, Zosimo, 5.30.4-5 kaj *PLRE* 2, Iustinianus 2.

[41] Sidonio Apolinario, *ep.* 5.10, kun *PLRE* 2, Pragmatius kaj Priscus Valerianus 8, kaj Hitzig, *Assessoren*, p.197; Valeriano estis pretora prefekto antaŭ 456.

Resume, gravis esti okulvidanto por historiistoj de la antikva mondo, en la malfrua romia imperio kiel pli frue. Dum en la klasikaj grekaj kaj romiaj periodoj, ofte okazis ke eminentuloj verkis siajn proprajn historiojn aŭ komentariojn, tia situacio raris en la malfrua periodo. Aliflanke, historiografo neniel velkis, sed eĉ pli vigliĝis post ioma forfalo en la tria jarcento; tamen la historiistoj de ĉi tiu periodo ĝenerale estis funkciuloj, trejnitaj juristoj, kiuj ofte enoficiĝis kiel konsilistoj (*assessores*) -kio donis al ili idealan okazon spekti gravajn eventojn okulvide-. Ĉi tie mi ankaŭ pli detale ekzamenis ĉi tiun postenon, el kio evidentiĝis ke ĝi pligraviĝis kaj iom pli profesiiĝis dum la jarcentoj: post la plendoj de Libanio pri Tisameno, oni ne plu konas similajn nesciulojn enofice, kvankam Justiniano devis leĝdoni por ekzameni tiujn kiujn oni deziris elekti konsilistoj. Ĝi do fariĝis ideala posteno por ambicia klera junulo, provizante lin per la eblecon ĉeesti gravajn eventojn (depende kie kaj kiun li servis) kaj poste ilin rakonti.[42]

Geoffrey Greatrex, Universitato de Kimrio, Kardifo, Britio.

[42] Pri la ŝanĝo en la statuso de historiistoj -profesiaj juristoj anstataŭ emeritiĝintaj eminentuloj- mi verkis aliloke; tie mi ankaŭ konsideris individue la historiistojn, inter kiuj estas ne nur Prokopio, sed ankaŭ Menandro, Agatio, Evagrio kaj Teofilakto Simokato, kaj montris ke preskaŭ senescepte ili ja estis trejnitaj juristoj, kaj multaj plenumis la oficon de *assessor*. vd. Greatrex, "Lawyers and historians", citilan supre, n.9.






## SOMMAIRE

### *ASSESSORES* ET HISTORIENS DU BAS-EMPIRE

Cet article traite des liens entre les historiens "classicisants" (tels Procope de Césarée et Priscus de Panium) du bas-empire et du poste d'*assessor*. L'auteur considère d'abord l'importance croissante du poste à travers la période de l'antiquité tardive. Ensuite il maintient qu'il s'agissait d'un poste particulièrement important aux jeunes hommes ambitieux, qui avaient reçu une éducation traditionelle, en leur fournissant la matière pour composer une oeuvre d'histoire. L'article complément le traitement du sujet par l'auteur, "Lawyers and historians in late antiquity", à paraître dans R. Mathisen et H. Sivan, éd., *Shifting Frontiers II. The transformation of Law and Society in Late Antiquity*.



## SUMARIO

### *ASSESSORES* E HISTORIADORES EN LA ÚLTIMA ÉPOCA DEL IMPERIO ROMANO

El presente articulo trata de la conexión existente entre los historiadores "clásicos" (tales como Procopio de Cesarea y Priscio de Panio) de la última época del Imperio Romano y el puesto de *assessor*. El autor considera la importancia creciente del puesto durante el período de la antigüedad tardía. El autor mantiene que se trataba de un puesto de particular importancia para los jóvenes ambiciosos, que habiendo recibido una educación tradicional, les ayudaba para la composición de obras de carácter histórico. El articulo complementa otro trabajo del mismo autor con el titulo "Lawyers and historians in late antiquity" que será publicado por R. Mathisen y H. Sivan, editores, en la obra *Shifting Frontiers II. The Transformation of Law and Society in Late Antiquity*.

SUMMARY

*ASSESSORES* AND HISTORIANS IN THE LATE ROMAN EMPIRE

This article considers the connection between classicising historians of the late Roman period (such as Procopius of Caesarea and Priscus of Panium) and the post of *assessor*. Having first considered the growing importance of the post late antiquity, the author argues it was of particular importance in furnishing ambitious young men, educated in the *liberales artes*, with the raw material for writing history. The article complements that of the same author entitled, "Lawyers and historians in late antiquity" forthcoming in R. Mathisen and H. Sivan, eds, *Shifting Frontiers II. The Transformation of Law and Society in Late Antiquity*.